### *Silabenigmo*

El jenaj silaboj formu la vortojn sube priskribitajn! La duaj kaj la sesaj literoj montros de supre al malsupre citaton de Albert Schweitzer.

a a a a am as aŭ ba bu bur ci di di di do do do dup e em es fan fi for go ĝen ĝi ho hu i ka ka ko la le li li lo men mi mo mu ni no o per re re ri ro ro ro sa se si so Stras sva tam te ti ti ti ti to to to to u ze

1. intestaj parazitaj vermoj
2. sukcesi, kredigi iun al aliulo
3. granda mambesto
4. kopio, dua ekzemplero
5. reprezentanto de ŝtato en fremda lando
6. nuntempe
7. tera tavolo, malrapide formita de maro ktp.
8. proprigi al si sorbitan substancon
9. granda franca urbo ĉe rivero Rejno
10. muzikinstrumento
11. konfirmeco al la reguloj pri beleco
12. bonmaniera, bonkonduta
13. emo, kiel unua komenci aferon
14. eĥo de interjecio
15. batalanto kontraŭ taŭroj en Hispanio
16. malsano kaŭzata de la dilatiĝo de ĉeloj
17. per simbolo skribita formo de ĥemia substanco
18. spekuli pri prezoŝanĝo de borsaj valoraĵoj

Solvo de la enigmo el la marta S.F.
l or, 2. Tor’ 3. rato 4. astro 5. ostaro 6. kastoro, 7.aktoro 8. karto 9. karo’ 10. ark' 11. ar- 12. mar’ 13, arom' 14. larmo 15. moralo. 16. markolo 17. Maroko 18. kromo 19. roko 20. kor’ 21 ok




# Stralsundaj frekvencoj

Per Esperanto por popolkompreniĝo
jaro 2004
majo

## Nun majo alvenis

laŭ populara germana kanto de Emanuel Geibel
muziko de Justus W. Lyra
tradukita de Ferdinand Feil



# *Pri la renkontoj de la Antaŭpomeria E-grupo Stralsund*

La Antaŭpomeria E-grupo en Stralsund klopodas sin, regule kunveni. Jes, estis jaroj, kiam ni eĉ dufoje en monato renkontiĝis, Bedaŭrinde la tempoprovizo de la membroj ne plu permesas tion, Jen labortempoj, kiuj malhelpas, jen familiaj aferoj sed finfine ankaŭ sanaj problemoj. Tamen ankaŭ lasttempe ni organizis kunvenojn en malgrandaj rondoj, nur ne tiel ofte.
Ĝis nun la Kulturligo ĉiam estis bona tegmenta asocio, kie ni ĉiam trovis restadon. Sed kiel ne eblas kapti ion el poŝo de nuda viro, tiel ankaŭ la urbo Stralsund baldaŭ ne plu povas teni la Kulturligon. La „poŝoj" estas malplenaj kaj oni intencas forvendi la plej belajn objektojn, inter ili la Scheele-domo. La Kulturligo ne mortos, sed niaj renkontiĝoj okazos ĉefe en privataj loĝejoj. Ni nur devas trovi konvenan lokon por nia abunda materialo. Ni povus fordoni kelkajn ekzemplerojn da lernolibroj kaj vortaroj.
La kontaktoj al afrika lando Benin plue funkcias kaj ni esperas, ke la infangrupo de Edeltraut baldaŭ kapablas korespondi. Tiel komplika la afero ja ne estas, sed ĝi kostas paciencon kaj ankaŭ monon.
Nia venonta renkontiĝo okazos laŭ plano je la 5a de majo en mia loĝojejo, Sanddornweg 62, en Stralsund. Gastoj ĉiam estas bonvenaj. Ni kutime okupiĝas pri literaturo kaj lingvaj demandoj. Kompreneble ne mankos kafo kaj kuko.

Gunter



La bildo montras la samideanojn dum nia januara kunveno ĉe Curt en Bergen

# ***Bonvenon en Neubrandenburg!***

(Pomerio — ponto inter germanoj kaj poloj)

Jen la programo de la ĉijara G.E.A.-kongreso en nia federacia lando:

| | | |
|---|---|---|
| Vendredo, la 28. 05. | | |
| - | 14a — 22a | akcepto en Ring-hotelo (kongresejo) |
| - | 17a — 18a | akcepto ĉe urbo-estrino |
| - | 18a — 19a | solena inaŭguro |
| - | 20a — 22.30a h. | interkona vespero kun Ralph Glomp |
| Sabato, la 29. 05. | | |
| - | 10a - lla | prelegoj al la ĉeftemo |
| - | 11.45a — 12.45a | urbo-rondiro |
| - | 14a — 17a | fakgrupoj (i.a. Pomeranio-renkontiĝo) |
| - | 17.30a — 18.30a | ekumena diservo |
| - | 19a h | bankedo |
| - | poste — 22.30a | kultura programo kun danco (Stanistaw Stokrotcki) |
| dimanĉo, la 30. 05. | | |
| - | 10a — 12a | plena kunsido de G.E. A. |
| - | 13.30a — 18.30 | ekskursoj al Anklam aŭ slava vilaĝo |
| - | 20a | nordgermana vespero |
| lundo, la 31, 05. | | |
| - | 8a | ekumena edifiĝo |
| - | 9a-11.30a | fakgrupoj |
| - | 12a | tagmanĝo kaj malfermo de la kongreso |
| - | poste | ekveturo al postkongresa ekskurso en Stralsund |

Kontaktu nin!

Gun.Eb@t-online.de

+49 3831 490003